Walter Klag
Stefan Klag

# SAT.IROJ




## Dekunua kajero

Unua eldono Vieno 2020




Foto sur la kovrilpaĝo de Walter Klag
Helsinko 2019

# Faktoj estas ekzistantaj estantaj realaj kontroleblaj aferoj.

## Nur por filozofoj kaj aliaj nepensantoj!

FAKTO
Io, kion oni scias reale ekzistinta aŭ ekzistanta.
„Esperanto estas fakto, kiun oni povas ŝati aŭ ne, sed kiun oni ne povas nei.” Jen citaĵo de KaBe. Bonega! Dankegon al KaBe!
*Sed kio estas ekzisti?*

EKZISTI
Efektive kaj nune esti.
*Sed kio estas „esti“?*

ESTI
Verbo uzata por akcenti la realecon.
*Sed kio estas „reala”?*

REALA
Efektive ekzistanta kaj kontrolebla.
*„Ekzistanta” ni jam komprenis. Sed kio estas „kontrolebla”?*

KONTROLI
Detale esplori, ĉu io estas tia, kia ĝi devas esti.
*„Esti” ni jam komprenis, sed kio estas esplori?*

ESPLORI
Fari la necesajn pridemandojn kaj enketojn, por ke afero povu esti juĝata.
*Sed kio estas „afero”?*

AFERO
Ĉio, kio estas en la mondo konkreta aŭ abstrakta.

Nun ni scias, kio estas fakto! Dankon al PIV!
Sed kio estas la diferenco inter fakto kaj kakto?

WK

## Kuracista helpo

„Sinjoro kuracisto, bonvole venu, mia infano glutis fontoplumon!”
„Jes, mi venos post kelkaj minutoj. Intertempe vi povas ....“
„Ho, ne gravas, mi povus ja uzi krajonon.“

# VOKO ALA

Por Sat.iroj 12 ni urĝe serĉas kontribuantojn!

Sendu al ni

- Malbonajn ŝercojn; ni plibonigis ilin.
- Fuŝajn bildojn; ni havas fotoŝopon.
- Konfuzajn tekstojn; ni havas PIVon.
- Tre longaj tekstoj utilas; oni ŝparas medikamentojn por endormiĝo.
- Ne zorgu pri la ĝustan uzon de la akuzativon. Ni forstrekos ĉiu eraro.
- Se viaj kontribuaĵoj ne aperas, pensu, ke ni havas reduktoron, kiu stucas frenezaĵojn.

Bonvole skribu al la eldonejo: esperanto@chello.at
Danko eterna garantiotas!

# KRINOLINO KONTRAŬ INFEKTO



**2020** La tuta mondo timis pro la terura kronviruso. 1 el 1000 infektiĝis, la plimulto rimarkis nenion, 1 el 10000 devis resti en hospitalo, ĉefe pro aliaj malsanoj. Preskaŭ la tuta homaro malaperis!

Jam en pasintaj jarcentoj oni timis infektojn. Tre efike estas lasi distancon al aliaj personoj. La supra foto montras distancigilon por virinoj. Ankaŭ viroj rajtas porti ĝin.



# ALBUMO FINVENKA

Nia

LIA
Long Island Association
...We're Connected
e-member
This business cares about our community and Long Island




sia
HOME FASHION

Lian Lian
CENTRO COMMERCIALE

IEN EUROPE 350TH ISSUE May 2008
Company Focus




THE NENIAN PRODUCTION

VASTA ASIA

KESTO

M&T
8
AGRABLA

Pick a Fries
REFARO

LEGADO
COFFEE ROASTERS
EST. 2010

TEDAS
SENSE FOR SAFETY

via
Vielfalt in Aktion

LEGILO B.V.

Café Especial - Agricultura Familiar - Indústria Brasileira
Aldoni
Café
O legítimo café caipira!

BESTON
GLOBAL FOOD COMPANY

kapego




Kapeto Crêpes
2016

ETAS

Rustado

BONVENA
medicina reprodutiva

Proudly
ETULO
BOY

**relego**
1. descanso
2. sossego, tranquilidade

**meudicionario.org**

VERSIO

FRAGO®
so clean

FRUKTO BIS
ZIĘTEK

havas
media














sam.buko

SAMBUKO

Designové knihovny

# DŘEVĚNÉ BEDÝNKY SAMBUKO

sambuko




La libro, kiu legas sin mem.
S. K.




**K A J   V I ?**